


# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 319 (85) KVINA EPOKO

NOVEMBRO-DECEMBRO 2001

## Les llengües del món



Nom: .....

Cursos: 4t, 5è i 6è d'Educació Primària.



GOVERN  
DE LES ILLES BALEARS  
Conselleria d'Educació i Cultura  
Direcció General de Política Lingüística

ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL  
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo  
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo *Monato* kaj libroj), IKEL, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *La Kancerkliniko*, *La Ondo de Esperanto*, *Litova Stelo*, *Scienca Revuo* (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

Ret - adreso: [kea@stel.net](mailto:kea@stel.net)

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 2001: Individua Abonanta Membro 3.500 p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Neus Moly; vicprezidanto: Josep Franquesa; kasisto kaj provizora sekretario: Llibert Puig; komitatanoj: Mercè Porta, Roger Prieto, Anna Casasús.

Kontrola Komisiono: Miquel A. Altuna, Arnald Massanas, Lluís Armadans.

Kataluna Esperantisto: Llibert Puig, Marina Ollé. Revizianto: Hèctor Alòs i Font.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Impres a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91  
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

## PREMIO DELFÍ DALMAU

La ĵurio de la Unua Premio Delfí Dalmau konsideris, ke indas aljuĝi Honoran Mencion al la originalo titolita *L'esperanto, rèquiem per una idea difunta?* (Esperanto, ĉu rekviemo por mortinta ideo?) de la ĝirona ĵurnalisto Moisès de Pablo.

Probable oni ne faris la necesan diskonigon de la premio, ĉar la periodo ekde kiam oni definitive aprobis la monasignon ĝis la limdato por la livero de originaloj estis fakte tre mallonga kaj ne eblis informi pri ĝi ĉiujn antaŭviditajn revuojn kaj instituciojn. Tial ĉi tiu estis la sola originalo alveninta, kio kondiĉis la decidon de la ĵurio.

Tamen la teksto de Moisès de Pablo montriĝis altnivela kaj akorda je la celoj kaj enhavo de la premio.

Dimanĉon la 14an de oktobro oni laŭtleĝis la verdikton en la kadro de la 30a Kataluna kaj 3a Transpirenea Kongreso de Esperanto en Ĝirono, en la Kultura Centro "La Mercè". Oni liveris al la honora menciito ĉekon laŭ la valoro de 50 eŭroj kaj la libron *Poliglotisme i raó. El discurs ecoidiomàtic de Delfí Dalmau* de Jordi Solé i Camardons.

(Abel Montagut, sekretario de la Premio Delfí Dalmau)

## MAJORKO

La tiea registaro aperigis du broŝurojn por la Baza Edukado titolitaj *Les llengües del món* (la lingvoj de la mondo) bele kaj kolore ilustritaj, kie Esperanto aperas plurfoje. Ni ŝuldas tion al nia samideanino Elisabet Abeyà kiel fakulo pri la temo kaj ŝin ni gratulas tre elkore. (Vidu nian kovrilon)

NI DEZIRAS FELIĈAN  
KAJ PROSPERAN  
NOVAN JARON AL ĈIUJ  
NIAJ MEMBROJ KAJ  
LEGANTOJ

## BADALONA

Nia tiea aktivulo Rubén Fernández denove anoncas sian foriron al Azio, ĉi-foje al Japanio, pro profesiaj kialoj. Ni deziras al li bonan laboron.

Li sendis al nia asocio 9-paĝan eseon pri la ideologio de Lanti, la kreinto de SAT, konsultebla en nia biblioteko.

## LLIÇÀ DE VALL

Nia tiea membro Delfí Dalmau i Argemir verkis por la revuo "Ronçana" en januaro kaj aprilo 2001 tre interesan kaj klarigan artikolon pri Zamenhof kaj Esperanto, kiujn li afable sendis por nia arkivo. Ni tre sincere dankas lin.

## SABADELL

Nia asocio kunlabore kun Centro de Esperanto Sabadell, organizis aranĝon sabaton la 15an de decembro okaze de la Zamenhof-Festo kaj la Internacia Tago de la Libro en Esperanto en la Sabadell-a sidejo, kun prelego de Dafydd ap Fergus, kimra ĵurnalisto laboranta en Bruselo, kiu prezentis la lingvan situacion en la eŭropa ĉefurbo. Prezentiĝis la plej kompleta libroservo kun novaj kaj malnovaj libroj, informejo pri la Humanitara Organizo *Espero* kaj je la fino la ĉeestantoj estis regalataj per lunĉo. (vidu foton)



## VILANOVA I LA GELTRÚ

Dum la tagoj 8a-11a de novembro, okazis tie Foiro de Asocioj, en kiu la loka Esperanto-Grupo Vilanova kun la kunlaboro de nia asocio, prezentis la literaturon, muzikon kaj teatron en Esperanto en memstara budo. Okazis ankaŭ koncerto de la kataluna ensemblo "Kaj Tiel Plu". Nome de Vinilkosmo kunlaboris la tuluza samideanino Sylvie Roques.

## ORDINARA ASEMBLEO DE KEA

Ĝi okazos sabaton la 16an de februaro 2002 en la sabadella sidejo, laŭ kunvokilo sendata kune kun ĉi tiu revuo. Bonvolu antaŭvidi vian ĉeeston en via agendo. La estraro troviĝas en malfacila situacio kaj nepras ĉies kunlaboro. Ni antaŭdankas vin!

## 31a KATALUNA KAJ

### 4a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

Nia venonta kongreso okazos en la majorka urbo Sóller dum la tagoj 1a, 2a kaj 3a de novembro ĉi-jaraj, 75 jarojn post la antaŭa kataluna kongreso okazinta tie en la jaro 1927. La Loka Kongresa Komitato (LKK) jam laboras pri la preparado kaj proponis nekutiman kongrestemon: *Tio, kio estas malgranda estas bela*. Sugestojn por la plibonigo de la programo dankos la LKK, al kiu vi povas vin turni laŭ la jena retadreso: [margabe@teleline.es](mailto:margabe@teleline.es)

En nia venonta revuo, aperonta en februaro 2002, ni informos pri la prepartlaboroj, pri provizora programo kaj eventuale ni kunsendos la aliĝilon.

Kunlaboru al la sukcesigo de nia kongreso per via partopreno. Antaŭvidu vian ĉeeston jam de nun.

## TURISMI EN BOSNIO

Post vizitoj al Bosnio kadre de esperantaj aranĝoj ekestis deziro unufoje vojaĝi tien familie kiel trankvilaj turistoj, t.e. kun tempo, sen iu ajn antaŭa plano, simple promenante kaj haltante tie, kie ŝajnas pli interese al ni.

Tiun revitan planon ni plenumis tiusomere, familio Puig-Ollé, (Òscar, Àngels, Selena kaj Muriel) kaj familio Collignon-Simó (Éric, Sílvia, Júlia kaj Marc). La lastan 12an de aŭgusto ni ekveturis al Bosnio kaj post agrablaj tranoktadoj ĉe la franc-itala limo kaj en Ljubljana ni atingis Klokotnica-n, fama inter la esperantistoj pro la projekto "Akvodukto Sistemo" de N.R.O. ESPERO.

Klokotnica troviĝas lime al serba parto de Bosnio (la Dayton-a interkonsento dividis Bosnion en du partojn, la serba Respubliko kaj la kroata-muzulmana Federacio) kaj venante per la aŭtoŝoseo Zagrebo-Belgrado, necesas turni dekstren en la urbo Slavonski Brod kaj iri suden dum kvindeko da kilometroj en la serba Respubliko. Nun, post la livero de Milošević kaj post iom-post-ioma liverado de aliaj militkrimuloj al la Internacia Kortumo en Nederlando, impresio estas, ke la internacia justico ne lasos la militkrimojn senpunaj, kaj ke la cirkulada libereco multe pliboniĝis en Bosnio. Eĉ ŝajnis, ke danĝero ekzistas pli pro difektita stato de la ŝoseoj ol pro fiagoj de naciaj fanatikuloj. Ĝenerala stato de la komunik-vojoj en Bosnio estas fakte tre problemiga. Ne ekzistas aŭtoŝoseoj kaj pro manko de investoj kaj pro troa trafiko-kvanto, ŝoseoj foje difektiĝas kaj ekaperas radaj sulkoj en ili.

Klokotnica estas vilaĝo, kiu unuavide pensigas la vizitanton pri reklamilo de kampara turismo. Situanta en la valo de rivero Spreĉa, ĝi etendiĝas sur montareto kaj konsistas el dometoj dissemitaj en ĉarma naturo de kampoj kaj arbaroj. Dolĉe devis esti vivi tie antaŭ la milito. Kiam ĝi komenciĝis, multaj loĝantoj el Doboĵ, la plej granda apuda urbo, nun en la serba parto de Bosnio, devis rifuĝi en Klokotnica kaj la vilaĝa loĝantaro pli ol triobliĝis rezulte.

Tie ni retrovis Fetah Zvirac, inĝeniero de Espero Sarajevo estrinta la projekton "Akvodukto-Sistemo" kaj Adil Halilović, ekonomikisto el la urbodomo de Klokotnica. Ili kondukis nin ĉe du familiojn de la vilaĝo, kun kiuj ni loĝis dum la tri tagoj de nia tiea restado. Krom tio ni vizitis la instalaĵojn (pumpilstacio, akvorezervujo, sandomo) de la estintaj kaj estantaj projektoj de ESPERO kaj la urbon Teŝanj.

En tiu regiono kaj tiuj vilaĝoj, se ne estas impresio de riĉeco, ankaŭ ne estas impresio de mizero. Vivo en la kamparo ŝajne permesas al ĉiuj havi legomĝardenetojn, bredi kelkajn bestojn, labori en la kampoj kaj havi la bazajn bezonojn kovritajn.

Post tri tagoj en tiu kampara kaj agrabla etoso, ni malsupreniris al Sarajevo sekvante la vojon Tuzla-Kladanj-Olovo kaj la valon de rivero Gostelja, kiuj prezentis al ni mirindajn verdajn pejzaĝojn.

La bosna ĉefurbo, pro alveno de multaj rifuĝintoj, ankoraŭ ne povantaj reiri hejmen, havas multe pli da loĝantoj ol antaŭ la milito. La loĝproblemo estas fakte la plej grava por plimulto da bosnoj same kiel senlaboreco, kiu atingas nivelojn de 40-50 %. Oni kalkulas, ke ĉ. 2,5 milionoj da homoj (el la 4,3 milionoj da loĝantoj, kiujn havis Bosnio antaŭ la milito) devis forlasi siajn loĝejojn pro la milito kaj plejparto el ili estas detruitaj. Laŭ la nuna ritmo de

rekonstruado, ĉefe financata de la internacia helpo, necesus sesdeko da jaroj por rekonstrui ĉiujn detruitajn loĝejojn.

Nun multaj homoj loĝas en okupitaj domoj, kies proprietuloj povas teorie reklami denove vivi en ili iam ajn. Fakte, ke multaj homoj ne reokupas siajn loĝejojn havas multajn kialojn: timo vivi en malamika etoso, kie najbaroj kaj administracio faros ĉion eblan por malhelpi kaj fuŝi la reinstaliĝon; timo ne trovi iun ajn havaĵon en la domo, ĉar multaj "okupantoj" kunportas ĉiujn meblojn, kaj eĉ fenestrojn kaj pordojn de la okupita domo, kiam ili translokiĝas; scio, ke okupanto de via domo povas iri nenien, ĉar lia domo estis detruita aŭ estas same okupata de aliaj rifuĝintoj. Tiu lasta okazo estas tiu de nia amiko Fetah Zvirac, ĉe kiu ni loĝis en Sarajevo. Fetah kaj lia familio vivas nun en apartamento, kiun ili okupas post detruigo de sia propra apartamento pro bombado de la serboj. La serba proprietulo de tiu apartamento rajtas reokupi ĝin, sed ne faras; tiukaze Fetah havus nenie, kien iri, kaj retrovus sin tutsimple surstrate.

Dum nia restado en Sarajevo ni kunvivis kun esperantistaj geamikoj, ĉefe kun la familioj de Senad kaj Azra Ĉolic, Fetah kaj Vasvija Zvirac kaj Kemal Jakupović kaj interkonatiĝis kun multaj aliaj homoj. Bosna gastigemo fakte ege kortuŝis nin, ĉar spite al ĉiu personaj dramoj, spite al la fakto, ke tre malfacilas trovi familion ne suferantan pro milita konsekvenco (morto, loĝmanko, senlaboro), ĉiuj bosnoj, kiujn ni renkontis, entuziasme gvidis nin, akompanis nin, rakontis, ŝercis kaj ĉiam elmontris tiun humuro-senton helpantan elteni la plej malbonajn travivaĵojn.

Sarajevo estas mirinda urbo, de kiu la turistoj bedaŭrinde kaj malprave dizertis. Oni povas nur varme rekomendi viziti ĝin, tiel helpante ĝian rekonstruadon. Promeni tra Bazarĉa, la turka kvartalo, estas plezuro. Plezuro por la okuloj: ĉiuj stratetoj estas ligitaj al tradicia metio (manfarado de kupraj artikloj, ledo-laboro, seruristoj, ktp.) kaj la metiistoj fieras klarigi kaj elmontri, ke ili lertas en la multjarcenta profesio. Plezuro por la oreloj pro diverspecaj balkanaj muzikoj aŭdeblaj de ie ajn kaj pro alvokoj de muezinoj al la preĝo. Plezuro por la gustumado kaj la flarado, ĉar spiri kaj gustumi "ĉebabĉice"-n (kolbasetoj ene de panpasta similaspekta al la greka "pita") aŭ delicajn cepojn, paprikojn, brasikfoliojn farĉitajn de rizo, hakitan viandaĵon kaj spicojn, aŭ ankaŭ simplan bosnan kafon estas interese kaj gastronomiaj malkovroj.

Promeni en la centro estas ankaŭ eduko pri toleremo, ĉar dum jarcentoj ortodoksaj preĝejoj, katolika katedralo, juda sinagogo kaj islamaj moskeoj kunvivis kiel bonaj najbaroj, kelkmetre distancaj unuj de la aliaj.

Dum nia oktaga tiea restado, ni ĝuis kulturon kaj ripozon, gapvagadojn kaj ekskursojn. Ni vizitis la monton Ingman, sidejon de la olimpikaj ludoj en 1984, banis nin en la diafanaj akvoj de la lago de Boraĉko, gejsero apud urbo Konjic, 50 km sude de Sarajevo kaj en rivero Neretva, kaj subĉiele kradrostis ĉe kampara domo de la patrino de Azra. Paradizaj verdejoj, kie malfacilas imagi, ke milito povis okazi.

En Sarajevo, krom Bazarĉa, ni vizitis ankaŭ la aŭstrian kvartalon kaj la nacian muzeon, kies etna parto, reprodukto de domo kaj vivo sub la otomana imperio, estas tre interesa. Sub gvidado de Fetah, ni vizitis lian kvartalon, Dobrinja, speco de enklavo apud la flughaveno, ĉirkaŭata kaj sieĝata dum la kvar militaj jaroj. Li klarigis, kial ili organizis la defendadon de la kvartalo kaj kiel homoj planis fosadon de tunelo inter Dobrinja kaj la

monto Ingman, kiu fakte fariĝis la sola elir- kaj enir-vojo de Sarajevo dum la milito kaj en kies fosado li havis ĉefan rolon kiel inĝeniero.

Sub la gvidado de Senad ni faris historian rondiron tra la centro, kiu finiĝis per vizito de eta Moskeo en la kvartalo de Azra. En tiu momento, kiam tro multe da homoj kulpas islamon pri ĉiuj surteraj malbonoj, per iu maniĥea interpretado, kiu kripligas kaj reduktas nin al fanatikuloj unu- aŭ ali-flankaj, estas bone sperti kaj senti la bosnan islamon pro ĝia malfermo, ĝia diskreto kaj ĝia alvoko al paco kaj interkompreniĝo.

En lasta numero de Bosna Lilio, en artikolo pri "Vero kaj Repaciĝo" kolektanta opiniojn pri tiuj postmilitaj temoj, elstaras opinio de la ĉefimamo de la ĉefmoskeo en Sarajevo Ismet Spahić, kiu, perdinta la tutan familion, edzinon, du filinojn kaj nepinon en 1992, respondas tiel al la demando pri puno de la militkrimuloj: "La krimuloj devas esti punitaj, sed ni ne povas esti juĝistoj. Tion devas fari kompetentaj institucioj... Pli malbone estus, se unu justa homo suferus, ol se cento da kulpuloj ne estus punitaj!" Kaj pri kunvivado inter popoloj en Bosnio, li aldonas: "Ni pluvivos kun niaj najbaroj! En socio, kia ĝi estas en Bosnio – pluroble plurala: en religia, etna, kultura, historia sencoj!"

Por mi, tiu opinio kaj niaj bosnaj ferioj kontribuis al plifirmigo de valoroj. En Sarajevo, krom provi mortigi popolon, oni provis mortigi ankaŭ humanismajn valorojn. Iu ajn kredanta pri kunvivado inter diversaj kulturoj kaj popoloj, pri neceso de historia memoro, toleremo kaj malfermo al la mondo ne povas ne solidariĝi, ne esti sentema kaj profunde tuŝita de tiu urbo kaj de la bosna situacio ĝenerale.

Éric Collignon



## KVINA EŬROP-UNIA ESPERANTO-KONGRESO

Post dek jaroj eŭropaj esperantistoj denove kunvenas en Verono. En Eŭropa Unio (E.U.) teorie validas la principo, ke ĉiuj oficialaj lingvoj de la Unio estas samrajtaj, sed la praktiko instruas, ke en multaj realaj situacioj la parolantoj de iuj lingvoj havas privilegian pozicion kompare kun la parolantoj de la ceteraj lingvoj. Tio estas konsekvenco de la nekontestebla fakto, ke estas tre malfacile kaj multekoste labori per multaj lingvoj. La uzado de komuna neŭtrala laborlingvo, kiu al neniu donu privilegion, povos alproksimigi la eŭropanojn al situacio de efektiva lingva egalrajteco. Tio ĉi estas ĝuste la temo de la 5a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazonta en Verono de la 23a ĝis la 28a de aŭgusto 2002: "Efektiva lingva egaleco: rajto de la eŭropanoj". Partoprenos en tiu ĉi kongreso homoj el la diversaj regionoj de Eŭropa Unio, kaj ankaŭ el aliaj eŭropaj landoj.

Jam en 1992, ĝuste 10 jarojn antaŭe, Verono gastigis Eŭropan Esperanto-Kongreson, kiu estis fakte kongreso de esperantistoj de la landoj apartenantaj al la Eŭropa Komunumo. Sekvis aliaj kongresoj, je du- aŭ tri-jaraj intervaloj, organizitaj sur la sama geografi-politika bazo, kaj intertempe la Eŭropa Komunumo fariĝis Eŭropa Unio; do tiaj kongresoj alprenis la pli ĝustan nomon "Eŭrop-Uniaj Esperanto-Kongresoj". Post la unua en Verono (Italio) en 1992, la dua okazis en Parizo (Francio) en 1995, la tria en Stutgarto (Germanio) en 1997, la kvara en Ostendo (Belgio) en 2000 kaj nun la kvina revenos al Verono en la jaro 2002. Tiuj kongresoj estas organizitaj de lokaj komitatoj sub la aŭspicioj de Eŭropa Esperanto-Unio, la kupola organizaĵo, kiu kunligas la landajn esperanto-asociojn de la landoj de Eŭropa Unio por komuna agado rilate al la instancoj de E.U. Okazos altnivelaj prelegoj kaj debatoj pri la kongresa temo, sed ne mankos ankaŭ alitemaj altnivelaj prelegoj.

La Komitato de Eŭropa Esperanto-Unio kunvenos labore kaj landaj Esperanto-asocioj povos havi siajn apartajn kunvenojn.

La turisma parto estos aparte prizorgata kaj la kongresanoj povos ĝui la belaĵojn de antikva norditalia urbo, kun ĝia historio kaj ĝiaj tradicioj, kaj de la regiono Venetio. Unu tago estos dediĉita al revivigo de la legendo de Julieta kaj Romeo.

El la provizora programo ni menciuj la prelegojn de John Wells kaj Humphrey Tonkin, specialisto pri Ŝekspiro, la partoprenon de Renato Corsetti, prezidanto de UEA, la krosadon per ekskluziva ŝipo sur la Garda Lago, la ekskurson al Venecio kaj la tutan tagon dediĉitan al Romeo kaj Julieta. (aliĝiloj haveblaj en nia asocio)

(el Eŭropa Bulteno n-ro 15)

### KORESPONDI DEZIRAS

Hungara familio pri ĉiuj temoj, ĉefe per retpoŝto. Ili estas: László Szelecki, la 47-jara patro, laboranta en komerca entrepreno kaj prezidanto de la E-Grupo "Brilanta Stelo" en vilaĝo Felsöpakony; Ilona Szelecki, la 44-jara patrino, oficistino en la sama entrepreno; Diana Szelecki, 22-jara filino, studentino en fremdultrafika ĉeflernejo, samtempe laboranta en hotelo; Attila Szelecki, 16-jara filo, gimnaziano. Retadreso: szelpak@freemail.hu Poŝtadreso: >...Szelecki, str. Zrinyi M. 29 - HU-2363 Felsöpakony (Hungario)

Barbara Kruszewska - woj. Polskiego, 62 A/9 - PL-19-300 ELK (Pollando), 34-jara, pri muziko, filmoj, trikado kaj floroj.

# INTERNACIE

## FERVOJISTA KONGRESO TRE PROKSIMA AL NI

Okazonta en Port-Vendres inter 9a kaj 14a de marto 2002. Malfermata al ne-fervojistoj kaj kun daŭro de restado elektebla. La kongresejo estos: Maison du CCE/SNCF "La Voile d'or", 2 Quai de la République, FR-66660 Port-Vendres.

En la programo elstaras prelego de D-ro Romano Bolognesi, vesperaj spektakloj, vizito de vinkeloj, duontaga ŝip-ekskurso, du tuttagaj ekskursoj: unu ŝipa laŭlonge de la "Costa Brava" kaj alia kun vizito de la nord-kataluna regiono (fortikaĵoj de Vilafranca del Conflent, de Mont-Lluís kaj de la suna formo de Font-Romeu kaj reveno per la "flava trajno".

Pri la restado la pezoj estas indikataj por unu persono en kompleta pensio (manĝoj kun trinkaĵo, festmanĝo, tranoktado) de sabato la 9an de marto vespere ĝis ĵaŭdo, la 14an de marto matene, inkluzive de la ekskursoj kaj aliĝkotizo (eblecoj 1 ĝis 4). Por la eblecoj 5 kaj 6 (eksterprogramaj) aldoniĝas la tranoktadoj kun matenmanĝoj de ĵaŭdo ĝis sabato matene (aliaj manĝoj elektotaj de la kongresanoj en restoracioj). Tualettukoj ne estos provizataj en la dormoĉambroj.

	En 2-lita ĉambro	En 1-lita ĉambro
Ebleco 1: de sabato vespere ĝis lundo posttagmeze	116 eŭroj	126 eŭroj
Ebleco 2: de sabato vespere ĝis mardo posttagmeze	170 "	180 "
Ebleco 3: de sabato vespere ĝis merkredo posttagmeze	240 "	253 "
Ebleco 4: de sabato vespere ĝis ĵaŭdo matene	295 "	312 "
Ebleco 5: de sabato vespere ĝis vendredo matene	311 "	330 "
Ebleco 6: de sabato vespere ĝis sabato matene (aliĝiloj haveblaj ĉe nia asocio)	327 "	347 "

## INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

La 28a Internacia Semajno de Esperanto okazos en la mediteranea urbo Sèta proksime de Montpeliero de la 24a ĝis la 31a de aŭgusto 2002. La lernantoj povas elekti inter 3 nivelaj kursoj gvidotaj de diversdevenaj personoj. La kursoj okazos matenon kaj finon de posttagmezo. La staĝejo estas agrabla kaj oni povos loĝi en unulita aŭ dulita ĉambro meze de granda pinarba parko kun privata vojeto aliganta la strandon.

Informojn kaj aliĝilojn petu de: Espéranto Culture et Progrès, 5 rue du docteur Roux, FR-30090 Montpelhièr; tel. 04 67 54 15 43 kaj retadreso: [yvierne@netcourrier.com](mailto:yvierne@netcourrier.com)

Vi povas konsulti ankaŭ la TTT-paĝon: [perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html](http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html)

## UNIVERSALA DEKLARACIO DE LINGVAJ RAJTOJ

Ni disponigos al niaj membroj ĝin petontaj, la katalunan version de ĉi tiu Deklaracio, tute senpage.

Interesiĝantoj pri la esperantlingva versio rekte petu de KCE, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando); retadreso: [kce.esperanto@bluewin.ch](mailto:kce.esperanto@bluewin.ch) Ĝi kostas 10 svisajn frankojn.

### KIAM FLORAS LA TIMIANOJ

Jen la unua libro, kiun nia asocio sukcesis mem eldoni<sup>1</sup> de post sia fondiĝo. Temas pri 100-paĝa verko kun formato 20 x 13'5 cm kaj kun 21 eroj (19 rakontoj kaj 2 poemoj). Unu el la poemoj titoligas la libron kaj pri ĝi rilatas ankaŭ la kovrila grafikaĵo. Vendoprezio: 6 eŭroj plus sendokostoj.

La verkon ni prezentis la 30an de novembro dum la omaĝo al ĝia aŭtoro Salvador Gumà, okaze de lia centjariĝo.

<sup>(1)</sup> Ni memoru tamen ke nia asocio kuneldonis kun Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino en la jaro 1997 la libron *Spite al ĉio Bosnio* eldonita en Bosnio kaj subvenciita de ni.